



Unum ovile et unus pastor.  
Unu ŝafejo kaj unu paŝtanta.  
(JOH., X, 16.)

# ESPERO KATOLIKA

INTERNACIA MONATA GAZETO, OFICIALA ORGANO de I. K. U. E.

---

## LA EŬĤARISTIA KONGRESO EN LOURDES. 22—26 JULIO.

---

Je la fino de la venonta monato Julio okazos, kiel oni scias, la 25-a de la Eŭĥaristiaj mondkongresoj. Okazaĵo plej grandsignifa.

Ne nur kiel 25-jara jubileo de la Eŭĥaristiaj kongresoj, ne nur kiel la 60-a jarreveno de la dogmodeklaro (8 Decembro 1854) de la Senmakula Konceptiono de Mario; ne nur ĉar ĝi devas superi en grandiozeco kaj brileco ĉiujn antaŭajn kongresojn; sed precipe ĉar la ĉefideo de *tiu-ĉi* kongreso estas: *la Regeĉo de N. S. Jesu-Kristo super la mondo*, t. e. de Kristo, kiu loĝas kaj laboras en la mondo, preĝante por ĝi, sin oferante, ĝin sanktigante, de la Eŭĥaristia Kristo: *adveniat regnum tuum Eucharisticum!* sed ankaŭ nun, kiel estis de la komenco kaj ĉiam: *adveniat per Mariam!* Per Mario al Jezuo, per Jezuo al la Patro.

Tiu ideo trovas subliman esprimon en la festado — ĉar estas festo — de Eŭĥaristia Kongreso en Lourdes. Kial? Tial ke tie klarege montriĝas, ke Mario kondukas la animojn al Jezuo, al Jezuo de la Eŭĥaristio. Jam antaŭ multaj jaroj estis atentigita al tio de Lia Papa Moŝto Pio X, tiame kardinalo, en bela pastoralo letero: „La speciala famo, destinita de la Dia Providenco por la sanktejo de Lourdes,

estas, kiel ni scias, jena, ke la Sanktega Virgulino de el ĉie la popolojn altiras tien, por ilin genufleksigi en adorado al la piedoj de ŝia dia Filo. Fakto tiel brilega, ke tiu ĉi sanktejo en la okuloj de la katolika mondo radias en la duobla brilo de centro de Mariokulto, kaj de plej bela trono de graco de la S. Eŭĥaristio.”

Tion ĉiu povas atesti, kiu havis la feliĉon ĉeesti en Lourdes la kortuŝantan Sakramento-procesion laŭlonge de la vicoj de centoj da malsanuloj; tion atestas la statistikoj de la miraklaj resaniĝoj, montrante kiel la plejmulto el ili okazas, ne dum la subakviĝo en la *piscine* (publika banakvujo), sed dum la ĉirkaŭirado de la S. Sakramento; tion atestas laŭtvoĉe la „kuracisto de Lourdes”, D-ro BOISSARIE, kiam li skribas: „Neniam, en neniu tempo, en neniu lando, Dio rivelis sin per pli ravaj, per pli nombraj mirakloj; kaj ĉiuj tiuj mirakloj kunfluigas ĉirkaŭ la S. Sakramento.”

\*  
\*  
\*

En Lourdes nu unue estos konsiderata la *doktrino* pri la *Reĝeco* de Jezu-Kristo super la homara societo tiel, kiel tiu doktrino troviĝas predikita en la S. Skribo, en la verkoj de la ekleziaj Patroj, ĉe la teologoj, en la liturgio; kiel ĝi estas trovebla en la literaturo kaj en la historio; kiel ĝi denove estas proponita al ni en la pieco al la S. Koro de Jezuo; kiel ĝi neatendite elvolviĝas kaj firmiĝas en la Eŭĥaristiaj mondkongresoj.

Post tio oni konsideros la *bonfarojn*, donitajn de la Eŭĥaristia Kristo al la homa societo pere de Lia ĉeestado en nia mezo, de la Mesofero, de la S. Komuniĝo. Jen la *teoria* parto de la programo.

La *praktika* parto okupos sin pri la pli fruigita Infan-komuniĝo kaj pri la multfoja kaj ĉiutaga Komuniĝo de ĉiuj infanoj de Dio.

Oni vidas, kiel intime, kompreneble, ambaŭ partoj kunligiĝas.

Kiu ja estos la plej bela, societa triumfo de N. S. Jezu Kristo? Ĉar la regno, kiu apartenas al Li kiel Kreinto kaj Savinto, la homara societo — de kiu Li estas Reĝo, ne malpli ol de la regno de la Anĝeloj — konsistas el apartaj

personoj, pro tio Lia fakta Reĝeco super la societo devas necese dependi de, kaj elflui el Lia Reĝeco super la animoj.

La disvastiĝo de Lia regno ne povas signifi ion alian, krom tio, ke Li per kredo kaj amo regadu en ĉiam pli multe da koroj; tiu disvastiĝo devas progresi de interne al ekstere, kaj je pli intima estas tiu interna kunligiteco de la apartaj personoj kun Jesu-Kristo, des pli abundajn fruktojn por la ekstera, societa vivo ĝi portos.

„La regno de Jesu-Kristo, diras P. LINTELO, kies ĉefideojn ni tie ĉi nur ripetos, „ne naskiĝas el ekstera jesigado de Liaj rajtoj, per kio ĉies animvivo pli aŭ malpli estas influata, sed precize eliras el tiu ĉi animvivo por la reformado de la societo, por la societa glorado de Kristo. Tiel estas okazinta en la unuaj Kristanjarcentoj: el la renoviĝo en Kristo de la individua vivo, senpere sekvis la renoviĝo de la societa vivo; kaj kiam pli poste la regno de Kristo komencis velkiĝi en la societo, tiam ĝi jam ĉesis ekzisti en multaj individuoj.”<sup>1)</sup>

\* \* \*

Nu, kiu estas la plej bona garantio de ĉies persona kunligiteco kun Kristo, de ĉies vivado kiel subulo de tiu spirita regno?

Ĝi estas la kiel eble plej ofta partopreno de la fideluloj al la Tablo de la Sinjoro; ĝi estas, por la daŭrigado kaj fortigado de la dia vivo, kiu animas la infanojn de Dio per la sanktiga graco, kiel eble plej abunde ĝui la dian nutraĵon, kiu estas Jesu-Kristo mem. Krom tio, tiu ĉi supernatura vivo devas esti defendata sencese kontraŭ la ruinigaj influoj tiel de ekstere, kiel de interne; krom tio, devas esti donata grandega rehonorigo, se ĝi iom kompensu la senhonorigojn, kiuj okazas en ĉiam pli granda amplekso ankaŭ al Jezuo en Lia S. Sakramento; devas trasonori laŭta, tra la mondo sonanta: „Venu regno Via!” kiel protesto kontraŭ la kriego de la nemortebila, milforma anti-

<sup>1)</sup> Vidu: R. P. LINTELO S. J. — L'Univers au pied du Saint-Sacrement. XXV Congrès Eucharistique, Lourdes. 22—26 Juillet 1914. — Montligeon (Orne). — Broŝuro 16-paĝa.

kristo: *Nolimus hunc regnare super nos!* „Ni ne volas, ke Tiu-ĉi regu super ni!”

La Komuniigo estas la dia vivosuko de la arbo de la Eklezio en dia pleneco; je pli, kaj pli malavare, ĝi trape-netras ĝis al la ekstremaj branĉoj kaj branĉetoj, des pli belega la arbo elkreskos, florante kaj fruktodonante, des pli larĝa ĝia foliaro etendiĝos super ĉiuj partoj de la tero. Pro tio la kvar ĉefaj Dekretoj de Papo Pio X por favori la multfojan kaj ĉiutagan Komuniigon estos la ĉeftemo dum la diskutadoj de tiu ĉi kongreso.

Jen fine tuŝanta ideo de P. LINTELO pro la dekreto pri la *Komuniigo de l' infanoj*.

Belaj estis dum la diversaj kongresoj Eŭharistiaj la procesioj de geinfanoj, kiuj en festvestoj, kantante kaj preĝante, kun siaj flagetoj, trairis la stratojn, precipe en la Protestanta Londono.

Pli bela ankoraŭ la realiĝo de la „Quam Singulari” en la ĝenerala komuniigo, disdonita de Ĉefepiskopoj kaj Episkopoj al 25.000 geinfanoj dum la Eŭharistia Kongreso de Madrido.

Sed la plej bela ni atendu dum la mondkongreso de Lourdes, se pastroj kaj gepatroj volu kunlabori por genufleksigi al la Tablo de la Sinjoro dum tiuj tagoj de 22—26 Julio ne nur 25.000, sed milionojn da geinfanoj tra la tuta Katolika mondo!

Ili, la geinfanoj, precipe devas deturni de ni per siaj senkulpeco kaj preĝado la batojn de la Dia kolero.

Ili, la geinfanoj, precipe devas doni rehonorigon al Jezuo en la Sakramento de Lia amo, por tiom da gepatroj, tiom da katolike baptitoj ankaŭ, kiu sin deturnas de Li kaj malkonfesas Lin.

Ili, la geinfanoj, devas komprenlerni, ke ili estas la unuevokitaj al la festeno de la plej pura amo; ke ilia unua Komuniigo ne estas memstara ago, sed nur la unua ĉenero de la amoĉeno, kiu tagon post tago devas kunligi ilian koron pli intime — ho! estu nerompeble! — kun la Koro de Jezuo.

Tiel la ĉefideo, kiun la proksima Eŭharistia Kongreso priparolos, povas esti resumita jenmaniere: *publika rekono de la Reĝeco de Jezuo super la tero; tiu ĉi Reĝeco supozas Lian Reĝecon super la koroj de la homoj; la du ĉefrimedoj por konfirmi tiun duoblan Reĝecon estas: la multfoja ricevo de la S. Eŭharistio kaj la propeto de Mario, la Senmakulino.*

J. ALB. THIJM, S. J.

El *De Maasbode* tradukis  
D-ro SMULDERS.

## Oficialaj Komunikoj.

### V-a Internacia Kongreso-Pilgrimo de la Katolikaj Esperantistoj en Lourdes

(12—17 Aŭgusto 1914)

Sub la alta Patronado kaj Honora Prezido de  
**L. E. M. Monsinjoro SCHŒPFER,**  
Episkopo de Tarbes kaj Lourdes.

*Karaj Geamikoj en Kristo!*

Pli kaj pli alproksimiĝas la epoko de nia kongreso.

Pli kaj pli ankaŭ grandiĝas certeco de ĝia sukceso.

Iom post iom, la aliĝoj alvenas: Jam preskaŭ, *sesdek* gesamideanoj aliĝis, kaj ni scias, ke *multaj* ankoraŭ intencas partopreni nian belan manifestacion.

Tre baldaŭ, mi denove veturos al Lourdes, kie mi definitive pretigos la detalan programon, sendotan al ĉiu aliĝinto.

Nun, la parolon ni donas al niaj diverslandaj eminentuloj. kiuj kunigas rian propsan alvokon al tiu de la komitato. Aŭdu iliajn elokventajn invitojn!

### PRAKTIKAJ SCIIGOJ.

La propagandaj *poŝtkartoj* kaj *glumarkoj* estas aĉeteblaj

ĉe nia kasistino. Oni bonvolu kiel eble plej multe ilin uzadi: ili estos tre efikaj sukcesigiloj.

Ilia prezo estas: 12 poŝtkartoj Sm. 0.40; 100 glumarkoj Sm. 0.40.

La afiŝoj ankaŭ estas presitaj. Prezo: Sm. 0.10 (aŭ 1 respondkupono po *du* ekzempleroj).

Responde al diversaj demandoj, ni informas:

1e. ke kolekta aranĝo (kun 50% rabato) por vojaĝo de Parizo al Lourdes kaj reveno, estos ebla, *nur* se 25 personoj decidis fari kune la saman vojaĝon. (La individua ordinara rabato estas 25 aŭ 30%);

2e. ke la mono pagita al la kasistino por pago de *hotelaj elspezoj* estus redonita (krom 10% deprena) al personoj, kiuj estus malhelpitaj ĉeesti la kongreson;

3e. ke la kvin-taga pensio ĉe la *kongresa-hotelo* komencos *kun la vespermanĝo de la 11a*, kaj finos *kun la tagmanĝo de la 16a*.

4e. La kuna foriro de Paris al Lourdes okazos la 10an de Aŭgusto vespere, t.e. *lundon* (*ne dimanĉon*, kiel mi erare skribis).

CL. COLAS.

---

## NI IRU AL LOURDES.

---

La ĉefurbo de Francujo pretiĝas por fari la plej simpatiplenan akcepton al la Esperantistoj de la tuta mondo, kiuj kunvenos en Paris, dum proksima Aŭgusto, por ilia „Deka”.

Ne povas esti pli taŭga cirkonstanco, por ke ĉiunaciaj Katolikaj Esperantistoj, amike kuniĝu, en la komuneco de sama fido kaj sama penso, kaj kune foriru al la plej mirinda juvelo de la katolika religio, kiu troviĝas en Francando, en la modernaj tempoj.

Ni iru multnombraj, karaj amikoj de la Katolik-Esperantista movado, porti la verdajn kolorojn de nia stelo kaj standardo, al la piedoj de la Benita Virgulino, kiu venis starante sur la pireneaj montoj — aperante al la mondo

sub la trajtoj de la Senmakula Konceptio, kiel la plej aminda, la plej Disimila personiĝo de la *Sankta Espero!*

Ni iru, kun koro tute plena je konfido, por meti sub la protekto, oftege *mirakle* efika, — de nia bona ĉiela patrino, la estontecon de nia afero, la preĝojn kaj petegojn farotajn por ni kaj niaj karuloj, — kiujn ni alportos al ŝi kun la tuta fervoreco de niaj devociplenaj animoj.

Ni iru, kun ĝoja rapidiĝo, revarmigi nian fidon ĉe la flamo de tiu spirita fajro „*Nia Sinjorino de Lourdes*”.

Ne sufiĉas, kiam oni parolas pri Lourdes, rememorigi tian aŭ tian konvertiĝon de nekredanto:

*Lourdes* estas mirinda tutaĵo, kiel bloko el plej diafana kaj plej pura marmoro, el kiu ni devas depreni nenian peceton:

*Lourdes* estas neantaŭvidita alfluado de homoj, ĉiam plimultiĝanta; ĝi estas la entuziasmo de la amasoj, kiuj preĝas, kantas, de la unuaj eklumoj de l' tago, ĝis la plej malfruaj horoj de la nokto; kiuj ne dormas aŭ dormas malbone; kiuj maltimas la sunon aŭ la pluvon; kiuj staradas en malseka koto, aŭ sub la brulantaj sunradioj; kiuj suferas ĉiujn atakojn de la vetero, kaj ĉiujn laciĝojn, por kanti, per senĉesaj litanioj, al la Virgulino de „*Massabielle*”, laŭdojn kaj preĝegojn.

*Lourdes* ĝi estas tiu karavanaro de malsanuloj, kiuj transiras Franclandon en malkomfortaj vagonoj; ĝi estas tiu mortantaro banigita en akvo glacia kaj nepura, trovanta la vivon tie, kie ili devus trovi la morton; ĝi estas tiu preĝantaro, kiu trinkadas la virigantajn akvojn de la mirakla fonto, kaj la bonaĵojn de la graco.

*Lourdes* ĝi estas la spektaklo de la „feliĉuloj de l'tero”, bankistoj, industriistoj, nobeloj, kiuj, kun nekredebla sinfororgesemo, foriĝas, dum semajnoj aŭ monatoj, el la agrablaj, el la komfortaĵoj de la vivo, por soldatiĝi, kiel modestaj militantoj, en la kuraĝa armeo de portistoj, — portantaj malsanuloj, je ĉiu horo de l' tago aŭ de la nokto, sur vojo al la flegejoj, de la banejo kaj de la Groto.

*Lourdes* ĝi estas tiu aro da altrangaj sinjorinoj, kiuj, kun la plej belaj nomoj el la nobelaro, fariĝas la sindonemaj



flegistinoj de la malriĉuloj kaj malsanuloj, kies vundojn plej naŭzigantajn ili vartas, — al kiuj senŝpare, kun nedirebla delikateco, ili donas la plej lacigajn kaj modestajn zorgojn, — tial ke ili vidas nur suferantajn membrojn de Kristo.

*Lourdes* ĝi estas tiu granda nombro da mirakloj, da resanigitaj korpoj, da reenvojigitaj animoj, kiujn naskas la trairado de la Sankta Hostio, aŭ la bano en la akvujo, aŭ la preĝo ĉe la Groto. Ĝi estas la admirinda rezignacio de ĉiuj al la volo de Dio!

*Lourdes* ĝi estas, sur nia tera ekzilejo, kvazaŭ ekvidita anguleto de la patrujo ĉiela; ĝi estas la **Virgulino Senmakula**, kiu, el dezerta rokego, faris centron de graco kaj supernatura vivo.

*Lourdes* ĝi estas la konstanta miraklo de homamasoj senĉese renaskiĝantaj, kiuj, konfidante al la parolo de la feliĉa vidantino, — simpla paŝtistineteto, — ĉiam moviĝadas al tiu favorigita Sanktejo.

Katolikaj Esperantistoj, de 12 ĝis 17-a de Aŭgusto proksima, ni ankaŭ, ĉar tiom multe da motivoj, tiel multaj facilaĵoj, nin alvokas, — ni ankaŭ miksu nian alfluon al la afluado de tiuj piaj amasoj. Nia Sinjorino de Lourdes repagos al ni, per fluigado de gracoj kaj bonaĵoj, la penadojn, kiujn ni estos farintaj, por ŝin kune kanti, glorigi kaj laŭdi!

Kanoniko CHAPEAU  
*Prezidanto de la Franca Ligo  
de Katolikaj Esperantistoj.*

## Katolische Esperantisten!

„Christo, Mariae, Petro adhaesit”, lautet die Inschrift auf dem Grabe des seligen Canisius. Wie dieser 1. deutsche Jesuit, so wollen auch wir treu ergeben sein unserem göttlichen Heilande Jesus Christus, seiner jungfräulichen Mutter Maria und seinem Statthalter auf Erden auf Petri Stuhl, dem hl. Vater.



Voriges Jahr war es unserer Katolischen Weltunion (I. K. U. E.) vergönnt, vor dem hl. Vater Pius X das Gelöbniſ unſwandelbarer Treue und Liebe abzulegen, da wir bei der Audienz unter Begleitung der päpſlichen Kapelle ſingen durften: Ni volas Dion!

Dieſes Jahr wollen wir frohen Herzens nach Lourdes pilgern zur Gnadenſtätte der lieben Mutter Gottes, um dort öffentlich unſere Verehrung und Liebe zur glorreichen Jungfrau, der makelloſen Mutter, zu bekunden.

„Unter Deinen Schutz und Schirm, o hl. Gottesgebärerin, ſtellen wir unſeren 5. Congress. Segne ihn, ſegne alle, die daran teilnehmen! Stehe uns bei mit Deiner machtvollen Fürbitte, daſſ alle Beſchlüſſe, die dort gefaſſt werden, beitragen zur Ehre Gottes, zum Ruhme deines göttlichen Sohnes, zum Wohle der hl. Kirche, zum Heile der unſterblichen Seelen!“

Ihr alle, die ihr Maria liebet, nehmet teil an der Wallfahrt nach Lourdes oder, falls euch dieſ nicht möglich iſt, ſchlieſſet wenigſtens dieſen Congress der Kath. Weltunion, der von 10. bis 16. Auguſt in Lourdes tagen wird, in euer Gebet ein.

Propſt BECKER.

Bromberg, im Mai 1914.

---

*Noto de la Redakcio.* — Eſcepte ni preſigas ſupran germanlingvan tekſton en E. K., pro reſpekto al la alſendinto, nia eminenta ſamideano P-ro Prepoſto BECKER. — Sed eſtas ununura eſcepto.

---

## Gefratoj en Kristo.

---

Plej bela revo de niaj junoj jaroj eſtis viziti Lourdes; preĝi antaŭ la Groto de Massabielle, eniri en la nombro de la feliĉuloj, kiuj ricevis de la Senmakula Patrino de Dio favoron ſpecialan.

Jen, karaj gefratoj, proksimiĝas la plej bela tago, la efektiviĝo de niaj deziroj, de niaj plej ĉarmaj revoj. Ni faru la eblon por ſendi tuj aliĝon, por ĉeesti nian Kvinan

Kongreson, por pilgrimi al la urbo de la ĉiela Senmakulino.

Ni aliru tien kun fido en la Koro, kun plej granda firma espero ricevi tie favoron, kiu devos ĝojigi nin por la tuta eterneco.

Dezirante preĝi en Lourdes kun multcentoj el vi kaj kun tre multaj esti fevorigita

Via

P-ro Jakobo BIANCHINI.

---

## AL LOURDES.

---

La Katolikaj Esperantistoj pilgrimos kaj kongresados en Lourdes. Partoprenado verŝajne plimultenombra estos ol la antaŭan jaron. La lacigeo ne premos tiel; la lando ne estas tiel varmega; la vojaĝo ne multekostas tiom; estos la sezono de la grandaj pilgrimaroj — kaj la Dipatrino allogas siajn infanojn al ŝia lando de Mirakloj. Anglujo, Germanujo, Aŭstrujo, Hispanujo, Belgujo, Francujo grand-nombre estas riprezentata — Nederlando ĉeestu en Lourdes konvene kaj imponante.

Ĉiam nia lando okupis gravegan lokon en I.K.U.E.-aj aferoj. Ni nur rememorigos la Hagan Kongreson kaj la reorganizadon kaj ekspluatadon de nia revuo *Espero Katolika*. Ankaŭ tiun-ĉi Lourdes'an entreprenon ni plej fortike devas subteni — se eble: *persone*.

Ĉiam ankaŭ Nederlando superis pro honorado de Maria. Jam dum la mezaj centjaroj ni posedis okdek miraklajn imagojn de la Dipatrino. Niaj du Marianaj Kongresoj sukcesegis. Nuntempe ni provizas, ĉiujare, ŝatindan amason da pilgrimoj al Kevelaer, Scherpenheuvel kaj Lourdes. Ho, ke ĉiu Esperantisto, kiu intencas vojaĝi Lourdes'on, dum tiu-ĉi somero, elektu niajn rangojn, pligrandigu nian ĥoron, kunfortigu nian laŭdon.

Al Lourdes!

La suno lumigas kaj varmigas la tutan mondon. Tiel la amo kompatema de Maria plenigas la tutan Kristanaron,

tamen en kelkaj karaj lokoj ĝi brilas kaj laboradas pli intense.

Al Lourdes!

Maria estas la helpado de la Kristanoj.

Nia Katolika movado estas por Kristo kaj por la Kristanaro: Ŝi benos niajn klopodojn.

La akvo kaj la suno de Lourdes fruktigu la Katolikan Esperantan Aferon.

Ho sankta Maria, Patrino de Di'

Popoloj Kristanaj nun kantas al vi:

Ave, ave, ave, Maria!

Vivu, vivu, vivu Maria!

En via sanktejo, Patrin' de l' Sinjor'

Ni kantos multfoje je via honor'

Ave, ave, ave, Maria!

H. LINNEBANK.

UDEN, Nederlando.

### 3-a Nomaro de Aliĝantoj al Nia Kvina (ĝis la 18-a de Majo).

F-ino Fr. van Amelsfort, Tilburg . . . . .	Nederlando.
Rev-a P-ro M. O'Connell, Enniscorthy . . . . .	Irlando.
Rev-a P-ro Desray, Ancenis (Loire-Inférieure)	Francujo.
S-ino Hennessey, New Ross . . . . .	Irlando.
S-ino Henriët-Nolotte, Dijon . . . . .	Francujo.
F-ino Chr. Kamp, Amsterdam . . . . .	Nederlando.
F-ino Kerwin, Gorey (C-o Wexford) . . . . .	Irlando.
F-ino Annie Lawler, Newtonbarry (C-o Wexford)	Irlando.
F-ino Cécile Letourneau, Paris . . . . .	Francujo.
F-ino A. Macary, Lyon . . . . .	Francujo.
S-ro L. Marquet, Bordeaux . . . . .	Francujo.
S-ro Edmundo Nalepa, Kassa . . . . .	Hungarujo.
F-ino Johanino van der Plas, Hago. . . . .	Nederlando.
S-ro P. A. Schendeler, Maria-Heide (Veghel)	Nederlando.
S-ro Turquet, notario, Laval . . . . .	Francujo.
S-ino Turquet, Laval . . . . .	Francujo.

S-ro Gabriel Turquet, Laval . . . . .	Francujo.
S-ro Pierre Turquet, Laval . . . . .	Francujo.
S-ro J. J. A, de Werd, Boxtel. . . . .	Nederlando.

**Monoferoj por aĉetado de Standardo kaj Memorskribaĵo  
Lasotaj en Lourdes:**

S-ro Ricardo Codorniu, Murcia, Hispanujo . . . . .	1 Sm.
S-ino Henriet-Nolotte, Dijon, Francujo . . . . .	1 Sm.
S-ino A. Macary, Lyon, Francujo . . . . .	0 Sm. 400
S-ro Georg Müller, Hochstadt a/Aisch, Bavarujo . . . . .	4 Sm.
S-ro Edmundo Nalepa, Kassa, Hungarujo . . . . .	0 Sm. 400
S-ro Turquet, Laval, Francujo . . . . .	2 Sm.
S-ro Henri Voirin, Nancy, Francujo . . . . .	0 Sm. 400
S-ro J. J. A. de Werd, Boxtel, Nederlando . . . . .	1 Sm. 200
	<hr/>
	10 Sm. 400
Jam ricevita . . . . .	29 Sm. 600
Sume . . . . .	<hr/>
	40 Sm.

**Por riparado de la tombo de abato Peltier:**

Profesoro Cart, Paris, Francujo . . . . .	2 Sm.
S-ino Freycon, Saint Chamond (Loire), Francujo . . . . .	0 Sm. 400
S-ro Edmundo Nalepa, Kassa, Hungarujo . . . . .	0 Sm. 300
F-ino Raffard, Saint Chamond (Loire), Francujo . . . . .	8 Sm.
S-ro Turquet, Laval, Francujo . . . . .	2 Sm.
S-ro Henri Voirin, Nancy, Francujo . . . . .	0 Sm. 800
	<hr/>
	13 Sm. 500
Jam ricevita . . . . .	14 Sm. 400
Sume . . . . .	<hr/>
	27 Sm. 200

Plue, F-ino Mathilde BORRET, en Hago, Nederlando, bonvolis sendi „por kiu ajn elspezo plej necesa je profito de la Kongreso” . . . . . 2 Sm.

*La Kastino:*

F-ino M. LARROCHE,  
55, rue de Vaugirard, Paris.



La vere belaj kongresmarkoj de „Nia Kvina” en Lourdes, kiuj estas eldonitaj diverskoloraj, kaj kiuj atendas amason da aĉetantoj.

## Kroniko de I. K. U. E.

### „NEDERLANDA KATOLIKO.”

#### Kvina Jarkunveno.

La 5-a jarkunveno de nia ligo okazis Dimanĉon la 26-an de Aprilo en Breda. Laŭ ĉiuj vidpunktoj ĝi sukcesis. Multaj partoprenis tiun unuan jarkvino-kunvenon.

Matene, ĉe alveno de la vagonaroj, nombro da gesinjoroj el Breda bonvenigis kaj gvidadis la vizitantojn.

Ni komencis, kiel kutime, la tagon per ĉeestado je Sankta Meso; poste la Rev-a Pastro ESSELAAR, O. S. K., el Uden eldiris Esperante predikon laŭ la Evangelio de la Bona Paŝtisto.

Post la spirita nutraĵo sekvis la fortigo de la korpa homo.

Tuj post kiam finiĝis la lunĉo komencis la kunveno de la Ligestraro, dum la aliaj vizitantoj, gvidataj de la Breda'aj gesinjoroj — ĝuis de la printempa posttagmezo kaj vizitis la grandan Preĝejon kaj la Reĝan militistan Aka-

demion. Poste multaj faris belan promenadon al kaj en la „Mastbosch” (Pinoj-arbaro).

La jarkunveno okazis en la granda salono de la „Katholieke Kring” (Katolika Rondo), kiu estis ornamita per flagoj kaj aplikaj eldiraĵoj.

Post la malfermo per la Kristana saluto, la prezidanto de la Breda'a grupo bonvenigis la samideanojn. La ĉefsekretario legis sian jarraporton, el kiu oni sciigis, ke kvar novaj grupoj estis starigitaj kaj la nombro da anoj pli-grandiĝis de 831 ĝis 879. La jarraporto skizis la starigon kaj kreskadon de la Ligo dum la 5-jara ekzistado.

Plie la raporto memoris la morton de kasisto S-ro Moŝto TH. C. VAN ERP kaj instigis la anojn por sekvi lian ekzemplon.

La prezidanto dankis la ĉefsekretarion ne sole por lia multa laboro dum la pasinta jaro sed ankaŭ por liaj laboraĵoj dum la 5-jara ekzistado de la Ligo. Plie li komunikis ke la Ligestraro reelektis la ĉefestraron kaj anstataŭ la mortinta kasisto S-ron P. HEILKER, lernejestro el Hoofddorp.

La sekretario de la komisiono por la propagando legis sian raporton kaj sciigis, ke la propagandistoj faris parolaĵojn en 13 diversaj lokoj.

La komisiono por la presaro sciigis, ke kvinfoje estis sendataj al 43 katolikaj gazetoj sciigoj pri nia movado kaj diversaj ĵurnaloj enpresis regule artikolojn.

Poste oni paŭzis, dume komisiono ekzamenis la rajtigdokumentojn de grupaj riprezentantoj, kaj post la remalfermo de la kunsido sciigis, ke 12 grupoj sendis riprezentanton.

Nur du proponoj estis ensenditaj por pritrakti, ili koncernis la eldonadon de propaganda-broŝuro kaj de nomaro. Ambaŭ proponoj estis aprobitaj.

La komuna tagmanĝo okazis post la jarkunveno je la sesa. Ankaŭ tiun ĉi fojon la tagmanĝado estis tiel gaja kiel ĉiam. Multaj toasty estis diritaj: S-ro KNAAPEN honoris la sinjorinojn kaj fraŭlinojn esperantistajn, kiuj tiel forte apogas nian movadon. Sinjoro DRIESSEN laŭdis la ĉefestraron, precipe la 4 anojn, kiuj de la komenco al ĝi

apartenas: prezidanto pastro POELL, sekretario VAN ZWET, subprezidanto kolonelo NIESTEN kaj D-ro SMULDERS. Apartan vorton da laŭdo dediĉis S-ro NIESTEN al D-ro SMULDERS (kiu ne ĉeestis pro malsano) pro liaj laboroj kiel ĉefredaktoro de „Espero Katoliko”.

Je la oka komenciĝis festkunveno, kiu ankaŭ servis kiel propaganda kunveno por la katolikoj el Breda. Granda nombro da interesiĝantoj ĉeestis. La prezidanto de Breda'a grupo bonvenigis la ĉeestantojn per mallonga malferma parolo kaj petis unuanime kanti „La Espero”. Tiam kantis la kvartelo el la Breda'a virĥoro tre laŭdinde kelkajn kantaĵojn.

La paroladisto de la vespero estis nia Liga prezidanto pastro POELL, kiu montris en konvinkiga parolado la facilecon, la eblecon kaj la neceson de mondhelplingvo, tiel el ĝenerala vidpunkto homa, kiel el vidpunkto katolika. Post finiĝo de tiu aplaŭdata parolado denove estis kantita unuanime la kantaĵon „Ni volas Dion” kaj poste kantis ankoraŭ la kvarteto tre aplaŭdinde kelkajn kantojn. La prezidanto S-ro VAN HULTEN fermante la kunsidon dankis la paroliston kaj kantistojn kaj instigis la interesiĝantojn el Breda fariĝi membroj.

Kontente ni povas rerigardi je tiu jarkunveno. La ordigado estis en bonaj manoj kaj la Breda'a grupo meritas laŭdon por la bona aranĝo.

H. B. VAN ZWET,

*Ĉefsekretario de „Nederlanda Katoliko”.*

Utreĥto, la 18-an de Majo 1914-a.

---

### BALDAŬ APEROS:

## Adresaro de Katolikaj Esperantistoj.

---

Ĝi komencas per latina grava, trofa artikolo pri graveco de Esperanto por la katolika mondo.

Sekvas en Esperanto historieto de I.K.U.E.; alvoko al la katolikaj scienculoj; entenas 1500 adresojn de katolikaj



geesperantistoj kaj 1000 adresojn de honestaj malkaraj hoteloj. Fine estas bela gramatiko de Esperanto en latina lingvo kun vortaro Esperanto-latino.

Ĉi tiu adresaro estas la plej grava kaj trafa varbilo de la Episkoparo kaj de la pastraro por nia afero. Ĉiu katoliko faru al si devon mendi *unu* ekzempleron plie por sia Episkopo aŭ por iu klera pastro.

Laboro estas longa kaj progresas rapide rilate al ĝia enhavo. La eldonisto deziras prezenti al la tuta katolika mondo verkon vere ŝatindan. Estas 200 paĝa volumo kaj kostas nur Sm. 0.60 por antaŭpagintaj; por postpagintoj, eble, iom pli. De nun oni povas sendi monon al S-ro A. PAOLET, *S. Vito ol Tagliamento* (Italujo). La unuaj pagintoj estas la unuaj servotaj. B.

---

## MEMORU

Ke nia S. Patro, la Papo PIO X-a deziras, ke en la tuta mondo oni prononcu sammaniere la latinan lingvon. En nia Unua Kat. Esper. Kongreso en Parizo ni voĉdonis laŭ deziro de la Papo. Jen nun bela efektiviĝo, Pastro BIANCHINI verkis 400 paĝan volumon, esperantan gramatikon de latina lingvo por esperantistoj. Per ĉi-tiu verko ĉiu esperantisto povos mem-lerni belan latinan lingvon dum mallonga tempo.

Ĉi-tiu grava kurso aperas unue en revuo *l' Esperanto*, poste rekorektita de eblaj eraretoj kolektiĝas en aparta volumo, kiun oni povas de nun aboni sendante al la eldonisto S-ro A. PAOLET, *S. Vito ol Tagliamento* (Italujo) 1 Sm. por 12 kajeroj.

---

## LA KATOLIKAJ SAMIDEANOJ EN GERMANUJO.

Dum la IX-a Germana Esperanto-Kongreso, kiu okazis en Leipzig je la Pentekosttagoj, la Katolikoj havis apartajn kunsidojn kaj diservojn, dum kiuj predikis P-ro BECKER.

En la Julia kajero ni presigos la detalojn.

# Leterkesto.

---

*Estiminda Redaktoro,*

Permesu al mi ion diri pri letero de Rev-a J. LINTL. La problemoj, kiujn nia Estiminda Samideano iniciatas pritraktii, estas tro gravaj por silenti pri ili.

1. Rilate al N. T. traduko la afero ŝajnas al ni tiel grava ke oni ne devus ĝin serioze diskuti sen antaŭa konsilo de la S. Seĝo. Sekve 1-e estus bone, se la Estraro de la Kongreso de Lourdes humile prezentu la problemon al la S. Seĝo petante konsilon; 2. antaŭ diskuti pri tiu temo estas nepre necese koni la kunlaborantojn, tre kompetentajn virojn, ĉar N. T. traduko devas havi ankaŭ komentarion. Sed por verki milpaĝon verkon necesas kelkaj kleraj laborremaj personoj; 3. ĉi tiu estas afero pritraktota en Lourdes ne per rapidega komuna konsido, sed per kelkaj apartaj kunsidoj inter kompetentuloj; 4. estus bone se ĉiu kunlaboranto alportus aŭ alsendus specimenon de almenaŭ dupaĝa laboro, por esplori kia estas plej akceptinda metodo. Sed por ĉi tio estas necese absolute eviti starigon de ideala komitato: la gravajn aferojn oni devas pritrakti inter specialistaj personoj kaj kun plej granda kaj konscienca seriozeco.

2. Dum la Kongreso de Parizo oni proponis kreadon de Religia vortaro. Dum la Kongreso en Hago oni starigis komitaton por tion fari. Ni tiam alportis kelkajn paĝojn de laboro farota por peti konsilojn, kaj mi insiste petis apartan kunsidon por diskuti inter la membroj de la komitato la aferon; sed pri aparta kunsido neniu volis aŭdi. Denove en Budapesto ni alportis kelkajn paĝojn de laboro farita, kaj petis kunsidon: sed oni ne respondis al mi: oni priparolis tie mil kaj unu aferojn, sed pri religia Vortaro neniu intencis diskutadi. Kompreneble ke mi nek alia membro de la komitato povas prilabori aparte verkon tiel gravan sen bona interkonsento. Sekve mi silentis kiel silentis ĉiuj aliaj.

Mi verkis parton de Religia Vortaro, sed mi ne eldonis

nek eldonos ĝin, ĉar mi ne estas kompetanta pri ĉiuj branĉaj de ĉi tiu verkego, kaj plie mi ne rajtas eldoni mem tiel gravan aŭtoritatan verkon.

Sekve ni petas, ke ĉiuj kiuj intencas prilabori Religion Vortaron sendu al E. K. sian nomon kaj sian ĝustan adreson por ke ni povu almenaŭ letere interkonsenti. Kaj rondirigi niajn manuskriptojn por reciproke korekti kaj aldoni. Kiam manuskripto estas de ĉiuj komitatanoj tralegita kaj korektita, oni povos ĝin presigi. Memoru ke klarigo de ĉiu vorto ne devas esti simpla vorto, sed kelklinia instruega artikoleto religia. Tuj kiam oni decidos pri tiu afero, mi estas preta komenci rondirigi mian manuskripton, por ke oni aldonu al ĝi la fruktojn de opa studado de almenaŭ dek kleraj personoj. Nur tiel ni atingos la celon, utilan celon por nia katolika biblioteko. Kun frataj salutoj al ĉiuj, Via

BIANCHINI.

---

## Bibliografio.

---

21. A. NEDOŜIVIN. *Pri solidareco inter esperantistoj*. Traduko de B. KOTZIN, *Kovno, Ruslando*. Prezo 10 sd.

Tiu-ĉi parolado estas vira defendo de Esperantista solidareco, estimo kaj helpado. Ĝi alcelas la antaŭjuĝojn de kelkaj Rusuloj opiniantaj, ke Esperantistoj membroj estas de ia internacia, sekreta, framasona societego, danĝera por la ŝtata kaj publika bonordo. Ni legis en ĝi pluajn veraĵojn kiuj, kiel eble plej laŭte, devas sonori tra Ne-esperantujo; ekzemple:

„la signifon kaj utilon de l' lingvo internacia oni pravas ne per rezonado kaj kredo, sed per simpla observado de la kuranta vivo, de la faktoj”. paĝ. 7.

„Kiam la registara lernejo prenos sur sin la instruadon de Esperanto, ne estos bezonaj la multnombraj kursoj ĉe la societoj.” paĝ. 9.

Bone, sed ni ne scias — nek povas tion kontroli — ke, „en la malproksima Azio (en Samoso kaj Ĥinlando) la adeptoj de

d-ro Esperanto estis persekutataj, eĉ mortigataj pro la prediko de Esperantismo.” paĝ. 6. — Ĉu vere?

22. *Gvidlibro tra Château-Thierry*. Departemento Aisne. Franclando. Esperanta-Oficejo, 2, rue Drugeon-Lecart.

Ilustrita gvidisto, por turistoj tra tiu belega kaj antikva urbo, kie naskiĝis i. a. la famkonata fabulisto Lafontaine.

23. *Biblioteko de la Suno Hispana*.

*La unuhora revfeliĉo*. El la *Rapida Teatro de Jacinto Benavente*. Traduko de *Novejarque*, kaj F-ino AMPARITO BENET. 8 paĝa. Valencia. 1914.

Entenas dialogan babiladon pri la homoj. Je la dekdua nokta horo, du porcelanaj kamenaj figuroj ekviviĝas kaj tuj ekdialogas.

24. *En la lando de la Blanka Monto*.

El la franca lingvo tradukis D-ro NOËL, *Paris*. Presa esperantista societo; 33, Rue Lacépède. Prezo: 0 Sm. 400 = 1 franc.

Ĝi rakontas dutagan ekskurson tra la blanka montaro. Utila kaj interesa libro por vojaĝontuloj en glacian mondon.

25. B. KOTZIN, ĉefredaktoro de „*La Ondo de Esperanto*“. *Historio kaj teorio de Ido*. Librejo Esperanto. Moskvo, *Lubjanskii proezd*, 3, Ruslando. 1913. Prezo: Sm. 0.53. 141 paĝa.

Jen ora libreto! Absoluta neniigo de la Idismo. Kiu studis tion-ĉi, ne plu timos idistan konfuzadon. Tre scienca, klara kaj dokumentplena klarigado de ĉiuj Idistaĵoj. Ni esperas ke la verko de nia ŝatata Rusa kunbatalanto estu legata de la tuta esperantistaro, por ke ĝi ne timu, sed daŭrigu la ĝojan laboron.

Ni elcerpis jenajn frazojn:

„Post la apero de Ido, la nombro de Esp. gazetoj proksimume okobligis. Ĝis nun aperas regule Idista gazeto nek en Ameriko, nek en Angllando. Ne malpli indifere rilatas al Ido la germanoj. En Ruslando aktive laboras por Ido ne pli ol 5—6 personoj kaj, kredeble en la tuta mondo oni trovas ne pli ol 300 personojn efektive lernintajn Idon”. paĝ. 140.

26. G. BIANCHINI. *Esperanto. Grammatica-Esercizi in*

*otto lezioni. Seconda edizione. 1913. Lire 0.20. Sm. 0.080.*  
In vendita pretto i principali librai — eks. in S. Vito al  
Tagliamento, Veneto.

Nova kaj fortika penado de l' aminda kaj amata pastro  
por disigadi la helplingvon en dolĉa Italujo. Sukcesu li!

H. LINNEBANK,  
*Krucordenano.*

Uden, Nederlando.

---

## Katolika Vivo Ĉiulanda.

---

### TRICENTJARA DATREVENO

#### de la Morto

de S. Kamilo de Lellis, Protektanto de l' Gemalsanuloj  
JULIO 1614—1914.

---

La 14-an de Julio 1614 mortis en Romo S. Kamilo DE LELLIS, fondinto de l' Ministroj de l' Malsanuloj; en tiu ĉi jaro do oni festadas la tricentjaran datrevenon de lia morto. Ministroj de l' Malsanuloj, aŭ kiel prave oni ĉie ilin nomas, Kamilanoj, organizis ĉiuloke, kie ili loĝadas, solenajn festadojn.

#### Naskiĝo kaj Juneco.

Kamilo naskiĝis la 25-an de Majo 1550 en Bukkianiko, malgranda urbeto de la tiama regno Napola, el kristana, nobla kaj bonstata familio. Lia patro estis Johano de l' Markizoj DE LELLIS, kuraĝa Kapitano de Karlo V; lia patrino, Kamilino KOMPELJO, ekvidis en sonĝo sian infaneton bruste ornamitan per kruco kaj trenantan aliajn samornamitajn infanojn: malluma sed feliĉa antaŭsigno de religia Ordeno.

Kristana estis lia edukado, sed li en la lernejo malmulte

profitis; iaj malseriozaj poezioj plej multe plaĉis al li; ludkartoj kaj ĵetkuboj fortege delogis lin. Sed bedaŭrinde, ankoraŭ dekdujara, li orfiĝis je patrino, la plej forta apogilo de sia juneco. Lia patro estis militisto: la patron al Ankono, dekokjara apenaŭ, li sekvis, por kune varbiĝi al Venecia servado; sed jen subita malsano ektranĉis la patran vivon.

Kamilo do restis vagira, malriĉa kaj sola; aldone ia veziketo ekaperinta sur la dekstra piedkolo aliformiĝis en vundon obstinan, kiu ne volis cikatriĝi. Pripensadis li pri tiu vundo resanigota; Romon li alvenas trovante loĝejon kaj kuracadon en la malsanulejo de S. Jakobo, kiel malsanulo kaj same malsanulisto.

Sed tiam li ne estis amema de l' malsanuloj; plie, li havis karakteron batigeman kun ĉiuj kaj nedreseblan ludemecon; forlasante siajn mizerindajn malsanulojn, li forkuradis ludadi kun Teveraj barkistoj. Pro tio-ĉi, antaŭ la resaniĝo, li estas forigita.

Soldatiĝas li kontraŭ la Turkoj; batalinte sub la flagoj Venecia kaj Hispana, fine kun iu roto fama je ludistoj, de li ĉiam termare serĉataj, li aliris Tunigon en Afriko. Tiele li travivadis kvin jarojn da vivo senpripensa, eĉ ekscitante unufoje duelon; li malamegis tamen tiujn kruelaĵojn, kiujn li vidadis farataj de l' kunmilitistoj.

Unuvorte lia vivo estis ludado, sed li malamis blasfemi, nek iam li sin makulis per tiu peko, pri kiu instruis la Apostolo: „De tiu ĉi oni ne aŭdu inter vi eĉ la nomon”. Tiamaniere Dio gardadis la vagan malŝpareman filon, ne permesante, ke li tute diboĉe malŝparu la fratran heredaĵon.

Preskaŭ sennombraj estas la danĝeroj, kiujn li renkontis en la soldata vivo: ekmalsaniĝo mortiga ekmalaperis per Sakramentoj; unufoje li treege riskiĝis esti altrafita per kugla hajlo; pro malsatego li estas devigita plifoje sin nutri per herboj kaj ĉevalaĵo, renkontante en la oftaj marvojaĝoj terurajn marventegojn.

En tiomaj malfeliĉoj lia ludema pasio restis ĉiam vivanta. Reveninte el Tunizo Palermon li tutan monaton ludadis kaj perdadis, kaj tra tritagnokta marventego atinginte Napolon, li forludadis surtuton, pafilon kaj pulvujojn.

### Konvertiĝo.

La mizerego tamen iom lin dresis: ŝanceliĝas Kamilo, ruĝiĝas . . . . sed fine ĉapelon en mano apudiĝas preĝejan pordon kaj almozpetas. Lia nobelsango tiam supreniris lian vizaĝon! . . . Kompatinda Kamilo! li eble tute ne pripensis pri la historio de l' vaga malŝparema filo, kiel jam bone troviĝadis, kiam li komencis tutseniĝi: „coepit egere“.

Li do mallaboremulo devis laboradi, por vivi, en fabriko ĉe la Kapucenoj. Taŭga parolado, mallonga sed penetrema, kortuŝigas lin tiel, ke li sentas sin trapikata kaj kordisŝirita. Emocio lin premeigas; eksurgenuante li frapadas al si senkomparte la bruston, ploregante kiel la malŝparema filo inter la brakoj de la patro. Estis la dua de Februaro 1575, Maripurigfesto.

Aniĝinte al Kapucena Ordeno, li ne povis daŭrigi tian vivon, ĉar lia krurvundo turmentita de la kruda tuniko remalfermiĝas: du fojojn pro la obstina vundo li estas eksigita el la Ordeno.

### Li ekkunigas unuajn anojn.

Malplezurege Kamilo adiaŭis la monaĥon vivadon; oni bonege salutas lian reaperon je la tria fojo en la Malsanulejo de S. Jakobo; kiom ŝanĝita de la pasinteco! Ne plu ludemeco, nek incitemeco, sed amo agema kaj lacigaj penadoj. Pro estimo oni elektas lin Ĉefadministranto.

Tio ĉi estas en la vivo de Kamilo paŝo decida: li sentis la tutan respondan pezon de l' nova mastraĵo, dediĉante sin volonteme al servado de l' gemizeruloj.

Sed ju pli lia sindonema karito grandiĝas, desmalpli li sin sentas taŭga, al la neceso: la flegistoj, aŭ devigitaj, aŭ aĉeteblaj, estis forlasemaj de sia ofico, perfidante sian devon; eĉ la Kapelenoj mem elmontriĝis malindaj. Kamilo pro ĉio tio ĉi ĝemadis; kiam jen antaŭ li ekbrilas ideo: kunigi bonfaremulojn, . . . . formi societon el tiuj . . . . kiuj ne havus alian zorgon krom la flegadon de l' malsanuloj . . . . kaj nepagotaj . . . . ilin ankoraŭ distingi per kruco sur vestaĵoj . . . ; ho se al Dio plaĉus! . . .



La trankvila kuraĝo de l' Sanktuloj helpadis lin; elektikte kelkajn dependulojn plej bonajn kaj trovinte ilin pretaj, li komencis grandan entreprenon. Malfacilaĵoj ĉie de ĉiuj malhelpas lin; sed jen vizio plena je trankvilo kaj konsolo: ŝajnas al li, ke sia Krucifikso fariĝas vivanta: jen movetante la kapon li denajlas la manojn kaj al li klare diras: „Kial vi timas, senkuraĝulo? Via entrepreno estas mia; mi progresigos ĝin eĉ per kontraŭagadoj.“

### **Fariĝas Pastro kaj fondas Domon-patrinon.**

Sed Kamilo estas laika, malklera, kaj kiu lin sekvados? Nu, li fariĝos Pastro. Oni vidis tiam Kamilon travizitanta la malsanulejajn salonojn, tenanta per manojn libron por lerni la lecionon. Kian miregon ekscitis li ĉe la Jezuitoj, li eksterordinarstatura kun junaĝaj knaboj, kiuj mokadis lin donante al li tiujn vortojn tradukotajn: „tarde venisti!“ (vi malfrue alvenis)!

Ne preterpasis tamen multe da tempo, kiam liaj instruistoj lin ŝatis inda je promocio. La jaron 1584 la 10-an de Junio li diris la unuan Meson.

Kamilo forlasis la Malsanulejon, komencante unuigi familion propran kun kelke da bonvoluloj. Ili ĉiutage iradis matenvespere al la Romaj Malsanulejoj, helpante korpanime la malsanulojn; reveninte domen ili preparadis al si rapide nutraĵon sobran, pregadis kaj prenadis iom da nekomforta ripozo.

La malgranda ero semita de Kamilo elkreskis en arbon malvelkan, kaj tuta Romo ĝuadis la ombron de ĝia branĉaro. Per Apostola Brevo en la jaro 1586 la Societo estas starigita Kongregacio, distingita de aliaj per Kruco Ruĝa sur la talaro kaj la surtuto; ĝi estas rajtigita elekti sian Estron, varbi anojn kaj vivadi kune en Malriĉeco, Ĉasteco, Obeeco koj servado al la malsanuloj eĉ pestinfektaj.

La preĝejo de S. M. MADALENO kaj la apuda domo ekokupita je la fino de l' sama jaro 1586, fariĝis por ĉiam la Domo-Patrinon de l' Ordeno kaj la loĝejo de ĝia Registaro.

### **Pesto kaj malsufiĉego.**

La nova Kongregacio de l' Ministroj de l' Malsanuloj gajnis al si la amemon kaj la estimon de ĉiuj. Bona famo disvastiĝadis kaj oni komencis postuladi ilin en aliajn urbojn.

Dumtempe Romo ekfariĝis teatro de teruro kaj morto. En somero de l' jaro 1590 ekaperis sur Kvirinalo inter velurteksistoj infektema febro, kiu disfaliĉis grandan nombron da personoj. Tie ĉi vi vidas Kamilon kun siaj idoj disdonadi larĝe ĉiujn helpojn de la kristana karito.

Sed dua malfeliĉo postsekvis en vintro proksima, kiu forportis pro malsatego kaj malvarmo sesdek milojn da personoj. Dismortadis la gemizeruloj sur la stratoj, sur la placoj, kun herbo en buŝo kiel bestoj, aŭ de pordo al pordo sin pene trenadis petante panon kaj plenigante la aeron per dolorigaj ĝemadoj.

La grandegeco de la malfeliĉo havis respondon en la koro grandanima de Kamilo, kiu helpis ĝis la heroeco per si mem kaj per siaj Religiuloj.

### **Starigo de l' Ordeno, ĝia disvastiĝo.**

Gregoro XIV-a starigas en Ordenon la Kongregacion post la heroaĵoj plenumitaj de Kamilo kaj Kamilidoj. La 8-an de Decembro 1591, feston de l' Senmakula Konceptio estis eldiritaj la solenaj religipromesoj.

Kamilo do povis ĝojadi, ĉar la malriĉuloj de Jezu-Kristo jam havas servantojn, kiel estas tre dezirinde. Lia senlima kompatemo lin tute alĵetadis en suferigajn laborojn kaj penadojn por la suferantaj proksimuloj. Alsendante anojn en diversajn urbojn por fondi novajn domojn, li volus plimultiĝi por esti ĉie kun ĉiuj; li estis kvazaŭ enamiĝinta je l' Malsanulejoj.

Nenio ŝajnas neebla al granda amo: Kamilo per fera volemo kapablas altrudi verajn amheroaĵojn al sia lacigita kaj kaduka korpo. Kiel puŝemega rivero disrompanta la digojn, kiel nedresebla ĉevalo liberigita kamparen, li trankuras tutan Italujon por akiradi Malsanulejojn, kie li povus flegadi la malsanulojn.

Sed maljuniĝante tro frue pro la lacigaj penadoj kaj la suferigaj malsanoj, li volis sin eksigi de Ĝeneralestreco, por vivadi senĉese en Malsanulejoj ĉe la gemalsanuloj, servadante al ili tagnokte korpanime.

Por li la Hospitaloj estas bonodoraj florigardenoj, por li la malsanuloj fariĝas aliaj Jesu-Kristoj, traktante kun ili kiel kun princidoj per la plej granda reverenco. Kiam Kamilo eniras Hospitalon, la malsanuloj ĝojas kiel vidantaj Anĝelon.

Fine lacigita pro tiom da senĉesaj laboradoj, kvazaŭ neniigita per longegaj malsanoj, precipe per tiu krurvundo terura, kiu ĉiam doloranta divigis lin lamiradi la tutan vivon, la 14-an de Julio 1614 li forlasis la teron por la ĉielo.

Lin beatigis Benedikto XIV en la jaro 1742 kaj la Papo mem sanktigis lin en la jaro 1746.

Leono XIII deklaris Kamilon De Lellis Protektanto de l' gemalsanuloj kaj de l' malsanulejoj.

P. SILVO RAVANELLI

de l' Kamilanoj.

Milano, 16-an de Majo 1914.

## PROFESORO MERCALLI SACERDOTO.

En la gazetaro ĉiu legis la morton de la Neapola Profesoro Mercalli, la estro de la Vesuv-observatorio. La grandaj ilustritaj ĵurnaloj donis lian portreton, kaj ĉiuj laŭdis lin pro liaj meritoj por la Scienco.

Neniu tamen diris ion pri la pastreco de tiu honorinda eminentulo. Tamen li estis sacerdoto kaj ĉiutage laŭpove li diris la S. Meson. La gazeto „Liberta” de Neapolo enhavis deklaron de pastro Ludoviko Martorelli, kiu i. a. skribis: „En la gazetoj multaj laŭdaĵoj sin trovis pri la famkonata Profesoro Mercalli. Estas vere, lia genio, lia studfervoro meritas pli grandan laŭdon ol tio, kion oni skribis pri li: nur pri unu oni silentis, nome pri tio ke Mercalli estis sacerdoto. Ĉiutage li malsupreniris la Vesuvion al plej proksima paroĥpreĝejo Agnello Maggiore en

Caponapoli; ĉiutage, kiam liaj studoj ne retenis lin nepre en la observejo, li diris la S. Meson, admirata pro la atenteco en kiu li faris la sanktan agadon. Ĉiutage je la 7-a li malsupreniris, restis kvaronon preĝante kaj iris poste al la altaro. Fininte la Meson, li denove dankpreĝis kvaronon. Plifoje oni demandis lin, diri la Meson por privata celo, oferante al li monon. Sed li ne akceptis la monon, promesante tamen oferi por nomita privata celo. Kiel vi vidas, la fama Profesoro Mercalli ne nur al la scienco kaj la Societo honoron portis, sed ankaŭ al la Religio kaj al la pastraro: ne nur kiel scienculo, sed ankaŭ kiel sacerdoto. Ekzempla sacerdoto estis profesoro Mercalli.”

El *Der Arbeiter* de 5 Apr. '14.

LOPO.

## Modela Fabriko en Nord-Brazillando.

Sub tiu-ci titolo aperis en la germana monatrevo „*Das Reich des Herzen Jesu*” kaj poste en la sama nederlanda revuo „*Het Rijk van het H. Hart van Jezus*”,<sup>1)</sup> artikolo, kiu laŭ humila kaj modesta mia opinio certe estas publikiĝinda al la ĉiulanda katolikaro. Kaj ĉu ilon pli taŭgan mi povus trovi ol la lingvon Zamenhofan kaj revuon pli bonan ol „*Espera Katolika*”?

<sup>1)</sup> „La Regno de la Sankta Koro de Jezuo.”

Ambaŭ ĉi tiuj kaj ankoraŭ la du franc-kaj itallingve verkitaj, sub la sama titolo aperantaj revuoj estas eldonaĵoj de la Pastroj de la Sankta Koro de Jezuo (redakcioj: Sittard, Bergen op Zoom, Lovano, Albino). Ilia Kongregacio estis fondita de la Tre Rev. Patro L. DEHON en la jaro 1877 ĉe St. Quentin (Francujo.) Mirige ĝi properis kaj je l' hodiaŭ tago ĝi jam nombras pli ol 450 membrojn en tri religiaj provincoj: la franc-belga, la germana, kaj la nederlanda.

La franc-belga provinco posedas diverscelajn domojn en Belgujo: Bruselo, Tervueren, Mons, Claire fontaine, Brugelette, Lovano kaj Quevy; kaj en Italujo: Romo, Albino kaj Bologna. Kvankam la Societo maskiĝis en Francujo, ĝi ne plu havas tie religiajn domojn sekve de la maljusta forpelado de monaĥoj kaj monaĥinoj. Multe

Bonvolu do, karaj gelegantoj, min sekvi tra la bruego de maŝinoj klakadantaj kaj de zumadantaj teksilaroj, sed unue konatiĝu ni kun D-ro Carlos Alberto de Menezes, kiu en Kamaragibe (Nord-Brazillando) realigis tion kion en Germanujo oni ĝuste admiras kaj laŭdas ĉe Franz Brandts (M. Gladbach) kaj en Francujo ĉe Léon Harmel (Val des Bois.)

Je l' fino de la 1880-aj jaroj alvenis D-ro Carlos Alberto de Menezes kiel ŝtatingeniero en Pernambuko por ĵeti novan fervojon. Kelke da jaroj poste li nomiĝis direktoro de la Tramvoj-societo en Recife. Ĉiam li superis pro sia profunda pieco kaj sia vere kristana bonfaremeco. Jam frue li eksentis la deziron kaj formis la intencon starigi ialoke grandan industrialan entreprenon, en kiu la malriĉa, forlasita, malŝatata kaj ordinare morale profunde falinta popolamaso de l'humilaj klasoj (ĉefparte nigruloj kaj bastardoj) povus trovi regulan laboron gajnigan. Tiamaniere li esperis nobligante influi en tiujn homojn, volante unue ilin vekti al vivo pli hominda kaj al deca ekzistado, sed penadante tiam ankaŭ el ili formi bonajn katolikojn per lerneja kaj eklezia instruado, per la de Dio donita Religio.

Por efektivigi tiun idealon li antaŭ ĉio devis malfermi la necesajn monfontojn kaj trovi la fortojn nepre bezono-

---

tamen da ĝiaj membroj laboras izolite en la malfeliĉa Francujo, i. a. en St. Quentin, Fayet, Val des Bois.

La germana provinco, kiu ne havas la rajton starigi domojn en Germanujo mem, posedas grandan misidomon en Nederlando: Sittard; — en Luksemburgo: Luksemburgo kaj Fünfbrünnen (Kvin fontoj); kaj en Bohemujo-Aŭstrio: Teplitz, Eger kaj Eichwald.

La provinco nederlanda havas domojn en Bergen op Zoom (Montoj sur Zomo), Astem, Liesbosch, Heer kaj Maastricht.

Komuna misio estas la Apostola Vikariato de Stanley-Falls en belga Kongolando. Krom tio la franc-belgaprovincanoj misias en Kanado (Alberta), la germanaprovincanoj en Kameruno kaj Sud-Brazillando, la nederlanda provincanoj en Nord-Brazillando kaj Svedujo. — *(Noto de la tradukinto.)*

tajn. En ĉio tio-ci Carlos Alberto montris pli ol ordinaran antaŭvidemecon kaj grandan kapablecon.

### **Fabrika organizo.**

Baldaŭ-la 23-an de januaro 1891, li sukcesis starigi la Pernambukan Industrian Societon (Companhia Industrial Pernambucana) kaj kiel ĝia direktoro oni elektis la posedanton de la kapitalpotenca banko „Pereira Carneiro.” Ankaŭ lian ĉefoficiston Antonion Marchado li simpatiigis por siaj planoj kaj ĉi tiu diligente kaj fervore laboradis al la entrepreno ĝis sia morto en la jaro 1908. Komence per Conselheiro Joaquim Corrêa de Aranjeo kaj poste per D-ro Malaquias Antonio Gonçalves, kiuj en Pernambuko estis altŝatataj, li sukcesis favorigi al sia entrepreno la tutan Registaron.

Tuj post la starigo de l' Industria Societo ĝi akiris grundon en Kamaraĝibe je 16 kilometroj okcidente de Pernambuko kaj tie ĝi komencis la konstruon de fabriko, kiu ampleksas spinejon, teksejon, blankigejon, kolorigejon kaj briligejon. Unue oni faris ringfornon, kiu devus liveri la ŝtonojn bezonotajn. La tuto kovris cirkaŭ 10.000 kv. metrojn da tero. La fundo konstruiĝis tute el cemento kaj en la tuta konstruaĵo oni evitis ĉian lignon por forigi fajrdanĝeron kiel eble plej bone. Tre malŝpare oni zorgis pri lumo kaj aero; viroj kaj virinoj havas apartajn enirejojn. Ankaŭ la akvokondukado estas perfekte prizorgita. Entute estas ne malpli ol 428 teksilaroj.

Samtempe kun la fabrikkonstruo oni komencis konstrui laboristan vilaĝon sur 25 metrojn alta kaj norde de la fabriko kuŝanta ebenaĵo. La mizeraj pajlaj domaĉoj devis malaperi kaj anstataŭiĝi per stonaj kaj — se oni atentis pri la tieaj cirkonstancoj — vere belaj domoj. Je l' hodiaŭa tago Kamaraĝibe posedas 160 tiajn domojn, kiuj je tre malalta prezo estas luataj de la laboristoj. Antaŭ la domoj troviĝas florbedoj kaj malantaŭe ĝardenetoj. Kelkaj senkurbaj stratoj donas al la vilaĝo bonordan aspekton. Kiel publikaj konstruaĵoj estas nomindaj la konsumejo, al kiu estas alligita granda bakejo, plue knablernejo kun instruistdomo, knabinlernejo kaj infangardejo kun instrui-

stinhejmo; poste la kuracista konsilejo kun kuracist-ĉambro kaj du salonegoj; fine la „Katolika Rondo” kun salonego kaj scenejo.

### **Religia organizo.**

Por aĉeti la maŝinojn bezonotajn en la jam el la tero leviĝanta frabriko, D-ro Carlos Alberto vojaĝis en la jaro 1892 Anglujon. Ne estis tamen nur la materiala progreso de sia entrepreno, kiu lin decidigis vojaĝi Eŭropon, sed ankaŭ kaj eĉ altgrade la spirita bonfarto de siaj estontaj laboristoj. Tial post farado de siaj aferoj en Anglujo, li iris Francujon por trovi pastrojn monaĥajn, kiuj volus helpi je la efektivigo de liaj idealoj. Pro tio li sin turnis al la direkcio de la unuiĝoj de S. Vincento en Parizo, el kie oni lin sendis al Val-des-Bois ĉe S-ro Léon HARMEL. Tiu-ĉi telegrafis al la Tre Rev. Patro L. DEHON, fondinto kaj ĝisnuna ĝenerala estro de la Societo de l' Pastroj de la Sankta Koro de Jezuo. Pastro el ĉi tiu Kongregacio jam estis zorganta en la grandaj fabrikoj de S-ro HARMEL pri la spirita kaj sociala bonfarto de la laboristaro kaj de ĝiaj familioj. Patro DEHON alvenis kaj baldaŭ li interkonsentis kun D-ro CARLOS: la fondo de domo por siaj spiritaj infanoj en Kamaragibe estis decidita. Samtempe D-ro CARLOS sukcesis varbi lertan inĝenieron por sia fabriko en la persono de S-ro Petro COLLIER. Nur poste ekmontriĝis, kion li akiris en tiu-ĉi viro, ĉar kune kun grandaj metiscioj li posedas ankaŭ multflankan edukitecon, precipe tamen ĉar kiel relegiemega katoliko fidele faranta sian ĉiutagan meditadon kaj ĉiutage alpaŝanta al la Tablo Sinjora, li estas la plej bona ekzemplo por la laboristoj. D-ro CARLOS al li edziniĝis sian plej maljunan filinon kaj je la morto de sia majstro en la jaro 1904 S-ro COLLIER fariĝis direktoro de la fabriko, kiun nuntempe ankoraŭ lertege li regas.

La 2an de Februaro 1893 alvenis en Pernambuko la unua misiisto Sebastiano MIQUET, kiu tuj en Kamaragibe komencis sian laboron. La fabrikkonstruo ne estis ankoraŭ tute finita kaj tial li gvidis la religiajn kunvenojn jen en la kapelo de l' proksima „engenho” (granda farmo), jen en la je 2 km. malproksima Caxanga. Baldaŭ tamen



salonego en la centro de l' fabrikfronto povis disponiĝi de la Patro. Estis ja la koridealo de Carlos ALBERTO vidi meze de sia laboristaro la Dian laboristamikon en la Plej Sankta Sakramento. El ĉi tio li atendis oftan preĝejeviziton, moralan releviĝon de la laborista popolamaso kaj tute specialan protekton kaj benon sur sia entrepreno en Kamaragibe. Kaj la estonto ne hontigis lian konfidon.

Pastro MIQUET renkontis personojn tre malklerajn, en koroj tamen de kiuj dormetis forta religiema animo. Tial estis sukcesplenaj la instruadoj de la Patro. Precipe per la enkonduko de la pieco je honoro de la Sankta Koro de Jezuo kaj de la „Apostolato de la preĝado” li sukcesis altiri kaj simpatiigi al la kristana vivo multe da personoj.

La laborrondo videble plivastiĝanta necesigis baldaŭ plifortigon al la unu misiisto.

La 3-an de Septembro 1895 alvenis Patro Maksiminó COTTART, kiun unu jaron poste sekvis Patro Lidvino RICHTERS, ĉar Patro MIQUET reiris Eŭropon. La Patroj nun montris nekredeblan kaj nelacigeblan laboremecon. Ili starigis kongregaciojn por pliprofundigi la piecon kaj ili fondis utilegajn organizaciojn por la bonfarto de la laboristaro.

Unue fondiĝis fraŭlinkongregacio por detiri la junulinojn el la morala marĉo, kiu tra la tuta regiono disĵetis spiron sian pereigantan; samtempe devis per ĝi fortikiĝi la Marihonorado kaj formiĝi por la estonto virtaj virinoj, virtaj patrinoj. La kongregacio baldaŭ prosperegis kaj nuntempe ĝi nombras pli ol 60 membrinojn el ĉiuj rangoj kaj raso. Valorplena helpo estis la fratino de D-ro COLLIER, kiu fraŭlino de post lia edziĝo kun Dona Maria ADELIA kiel prezidantino funkciis. Sed antaŭ du jaroj, ho ve! al Dio plaĉis forpreni ŝin post malsaneco el ŝia vivo agriĉa al pli feliĉa vivo eterna.

En „anĝela kongregacio” unuiĝas la knabinetoj kaj oni penadas ilin instigi al deligenta lernado kaj al vera pieco. Tiu-ci unuiĝo estas la pretigo al la fraŭlina kongregacio.

La plej virtajn el la poste fondita infanogardejo oni ricevas en la unuiĝo de S. Filomeno. Depost la sepa jaro

ili estas regule kondukataj al la Sankta Sakramento de la Pento.

Unuiĝo de „kristanaj patrinoj” sub la patroninado de Sankta Anno celas vivigi la kristanan vivon en la familioj kaj en karito helpi unu la alian, precipe en malsanecoj. Benriĉe plenumas ĉi tiu unuiĝo sian belan taskon ĉe malriĉaj multinfanaj familioj, malriĉaj fraŭlinoj kaj vidvinoj.

Por la viroj enkondukiĝis la Sankta-Vincentkonferencoj, kiuj jam multe da malriĉuloj liberigis el mizerego preme-ganta.

La plej virtaj junuloj aniĝis al la Sankta-Mikael korporacio. Per instigado al regula recevo de la Sanktaj Sakramentoj, per decaj legaĵoj akireblaj en nove fondita biblioteko kaj per laŭlegaj amuzoj oni penadis protekti ilin kontraŭ la danĝeroj minacantaj. Tiun korporacion poste ŝanĝis Patro WEDEMEIER, la nuna almozisto, en „Katolika Rondo”, por kiu oni konstruis salonegon kun scenejo, por ke tiel ankaŭ ne-membrojn oni povus allogi al la instruadoj kaj amuzadoj, kaj tiamaniere detiri multe da viroj el vojoj malpermesataj, danĝeraj.

De la Fratoj-Mariistoj estis fondita en la jaro 1907 Aloisio-kongregacio por iliaj lernantoj.

Zorgi pri instruoj por ĉiuj tiuj korporacioj, konduki ilin regule al la Sanktaj Sakramentoj kaj ilin observadi: ĉio tio-ĉi ne estis tasko facila por la Patroj. Ne tamen evitegis ili la laboron, eĉ aliajn taskojn, kiuj ne apartenas al ofico ilia, ili al si surŝultris. Tiel ili gvidis la instruon ĝis la alveno de la Fratinoj en la jaro 1901. Patro MAKSIMINO konstruigis en sia ĝardeno malgrandan teatron, kiu devus allogi scivolemulojn el malproksimaj regionoj kaj ilin edifi kaj instrui.

### **Sociala organizo.**

Je instigado kaj konsilo de la Patroj la „Industria Societo”, sub precipa kunlaborado de D-ro Carlos ALBERTO, starigis la 1-an de julio 1900 „Korporacio por la laboristaj interesoj” (Corporação operaria). Per tiu-ĉi devus leviĝi la tuta laboristaro Kamaragiba je pli alta nivelo religia same kiel ekonomia.

Ĝia centra estraro formiĝas el la direktantaj personoj de la fabriko, nome: la direktoro kaj subdirektoro, kaj el 20 laboristoj, el kiuj 10 estas nomitaj de la direktoro kaj la 10 aliaj estas elektitaj de la laboristaro.

Laborista komitato defendas la laboristajn interesojn ĉe la fabrikdirekcio. Same formiĝis komitato, kiu devas sin ŝargi je la kulturaferoj, instruproblemoj kaj karitaj aranĝoj.

El tri fontoj alfluas al la korporacio la mona helpo: unue la Industria Societo paĝas jare 10.000 Sm., poste ĉiu laboristo pagas monate duonan tagsalajron, kiuj kotizaĵoj faras ĉiujare sumon da pli ol 10.000 Sm., kaj fine aldoniĝas la saldoj de la konsumunuiĝo, kiuj jare produktas ĉirkaŭ 1250 Sm.

La korporacio havas kiel specialan protektanton la Dian Koron de Jezuo, kies festo ĉiujare estas memorata kiel eble plej solene.

Por dividi pli bone la laboron, oni dispecigis la korporacion en tri sekcioj: 1. La ĉefsekcio (Parte central). 2. La Asocio por reciproka subtenado (Sociedade de Mutuo Socorro). 3. La kooperativa asocio (Sociedade cooperativa).

La ĉefsekcio sin ŝargas je la Diservo, la kapelo kaj la apartigitaj korporacioj. Ĝi do ankaŭ zorgas pri la misiistoj, la kulto kaj la aliaj preĝejaj bezonoj, por kiuj celoj ĝi jam elspezis 32.000 Sm. Ankaŭ la lernejo kaj la geinstruistaro estas regata de ĝi. Depost la jaro 1901 la Fratinoj de la Sankta Familio gvidas la lernejan instruadon kaj en la jaro 1902 la Fratoj-Mariistoj anstataŭis ilin en la knaboinstruado. Entute instruiĝas 200 infanoj. Krom ĉi tiuj ankoraŭ 60 laboristoj kaj laboristinoj sekvas la vesperkursojn. Tial do ne estas miriga ke vere belegajn rezultatojn oni estas akirinta en Kamaraĝibe. Tie la nombro da neleguloj kaj neskribuloj estas nur 25<sup>0</sup>/<sub>0</sub>, dum en la cetera parto de Brazillando ĝi atingas 85<sup>0</sup>/<sub>0</sub>. Por la instruo oni ĝis nun elspezis 60.000 Sm., por higieno kaj komuna bonfarto 9000 Sm.

Krom tio la ĉefsekcio devas zorgi pri la publika bonordo, la lokaj plibonigoj kaj plibeligoj; fine ĝi zorgas ankaŭ pri la progresado de la muzik- kaj teatrasocio, organizas kaj kontrolas la festojn kaj la publikajn amuzojn.

La Asocio por reciproka subtenado zorgas pri kuracisto kaj kuraciloj, por kiuj ĝis nun ĝi elspezis 55.000 Sm.; ĝi helpas ankaŭ je la morto de ĝiaj membroj kaj portas parton de la enterigkosto. Utilega fine estas sur sociala kampo ĝia subtenado je malsanecoj kaj akcidentoj.

La kooperativa asocio estas precipe konsumunuiĝo, funkcia tamen samtempe kiel ŝparkas- kaj laborist-asekurinstitucio. Ĉe ĝi la laboristoj povas ĉiutempe deponi je 5% siajn ŝparmonerojn kaj ankaŭ repreni ĉiumomente sian monon kun rentumo. En la konsumejo doniĝas je ĉiu aĉeto asignoj, kiuj por ĉiu kliento kuniĝas kaj tie konserviĝas. La de la asignoj reprezentata ŝparkapitalo redoniĝas kun la procentoj al ĉiu je la aĝo kvindekjara; oni povas tamen ankaŭ ricevi sian monon je tempo laŭvola. Se mortas kliento, tiam tuj la posedo de lia ŝparkapitalo estas aljuĝata al liaj heredantoj. Se forlasas iu la fabrikon, al li estas repagita ankaŭ tuj.

Trarigardinte tiamaniere la historion kaj la bonegan organizon de la fabriko en Kamaraĝibe, oni tre facile komprenas ke tie ne mankas la laborfortoj, dum en cetera Brazillando preskaŭ ĉiuloke estas ankoraŭ farinda la unua paŝo sur sociala kampo. Entute 750 personoj estas alligataj al la fabriko: 380 viroj, 250 virinoj kaj 120 pli ol 12-jaraj gejunuloj (ĉesas je tiu aĝo la lernejavizitado). La labordaŭro estas dek-, sabate okhora por viroj, por patrinoj naŭhora, ĉar ĉi tiuj tagmeze kaj vespere forlasas la fabrikon duonan horon pli frue pro kuirejokopadoj (kiuj en Brazillando ne postulas tre multe da tempo).

La plej gajnigaj oficoj estas disdonitaj — lerteco supozite — al tiuj, kiuj havas la plej multe da familizorgoj, tiel ekz. al viroj kun multinfana familio kaj al vidvinoj, kiuj devas zorgi pri infanoj. La idoj de la laborist-familioj ekhavas la rajton de riceviĝo en la fabrikon tuj kiam ili estas akirintaj la ateston de regula lernejavizitado ĝis la aĝo fiksita.

Jen, karaj gelegantoj, belega entrepreno en Nord-Brazillando starigita, entrepreno, kiu estas dediĉita al la Dia

Koro kaj sur kiu videble ripozas la Dia beno. Donu la Sinjoro, ke tra multe da jaroj ankoraŭ ĉi tiu institucio, en kiu moderna industrio kun religiemeco profunda sin renkontis, ekzercos benriĉan sian influon en la multajn centojn da homoj, kiuj konfidplene venis Kamaragiben. Estu ĝi ankoraŭ instigo al aliaj katolikaj industriistoj, kiuj vere deziras la feliĉon de sia laboristaro.

Esperantigis

L. A. MARREVEE, Teol. Stud.

## LA GEINFANOJ DE LA NEĜO.

### Karnavala Rakonto

de F. FINN, S. J.

Estas malserena posttagmezo, unu el la unuaj tagoj de Februaro. La lastaj sunoradioj malforte lumigas al vasta etendaĵo de senkreskaĵa kaj nivela lando, — senkreskaĵa kaj nivela, se vi esceptas unu arbon, kiu staras sola, mal-dika kaj malloga, disetendanta renkonte al la orienta vento siajn nudajn branĉojn, kvazaŭ por mute protesti kontraŭ sia soleco. La ĉielo, krom okcidente kie ĝi estas ankoraŭ blua kaj nekovrita, havas malhelan plumban koloron; ĝi minacante rigardadas tiun vastan etendaĵon, — teruraĵo minacas teruraĵon. La radioj de la suno iomete maldensigas la suban mallumon, sed eĉ ilia lumo estas stranga kaj nenatura, ĝi estas lumo de uragana vespersuno; kaj dum ĉi tiu sibiras la okcidentan horizonton, la malhela krepusko rapide enrampas sur la scenejon kaj ĝian alvenon heroldas subita falo de la ĉielo en malpezaj flokoj, kies movadoj kaj balancadoj pruntedonas al la lastaj lumetoj de la finiĝanta tago enpensigantan belecon. Senbrue falas tiuj ĉielaj senditetoj, turniĝadantaj kiel koboldoj dancantaj; lace ili alvenas ĝis la malhela tero kaj heligas ĝin per subita ĉarmo. Pli rapide kaj pli dike ili falas, fortikitaj per sia grandaro, dum pli kaj pli densiĝas la krepusko, tiel

ke, per la helo de sia vintra edziĝavesto, beligas la terura solejo.

Terura solejo! Ĉu ne vibrigis la senbruan aeron arĝentsona rido? Kaj kiuj estas tiuj, kiuj trapaŝas tiun teruran regionon? Ili kredeble malsupren venis kun la neĝo, — senbrue demetitaj de supre, — de iu brila stelo de pli bela lando. Tenante unu la alian per la manoj, ili antaŭen iras — knabineto en blanka vestaĵo, — knabeto kun nigra surtuto brilanta per neĝeroj.

La knabineto tiel bela estas je la vizaĝo kiel je la vesto. Inter ŝiaj haroj, dense ĉirkaŭantaj ŝian frunton kaj falantaj per ondoliniaj faskoj super ŝiajn ŝultrojn, grandvalora juvelo briladas, — hele kaj bele ĝi briladas sed per malŝatinda beleco en komparo kun la lumo de ŝiaj okuloj — ŝiaj belaj, profundaj, nigraj okuloj, per kiuj ŝi rigardadas la teraĵojn kun la tuta dolĉa senkulpeco de vivo konsistanta el amo, boneco kaj sentima fido. Ŝia vizaĝo havas riĉan olivan koloron kaj ĉiu el ŝiaj trajtoj estas delikata, regula kaj nobla. Sur ŝiaj ŝultroj elegante kuŝas mantelo mola kaj tiel blanka kiel la petola neĝo; ankaŭ ŝia vestaĵo estas neĝoblanka, diversigata per neniu alia koloraĵo ol ŝia perla ĉirkaŭkolo.

Strange simila al la knabineto estas la knabeto. Lia vizaĝkoloro estas iomete pli malhela, liaj okuloj iomete pli nigraj, li estas pli granda ol ŝi je multaj koloroj. Lia surtuto, surŝutetita per neĝeroj, estas malantaŭen forigita, lasante vidi lian faldigitan ĉemizon, sur kies brusto brilas du juvelaj butonoj kaj helkoloran silkan fulardon ĉirkaŭantan lian kolon.

La netaŭgecon de sia situacio ili ne ŝajnas ekvidi, ĉar ili ridadas kaj interparoletadas per arĝentsonaj voĉoj, kiuj ĉarmus eĉ silenton.

„Ĉu ili ne estas agrablaj, tiuj beletaj neĝeroj?” diras la malgrandulino Itale parolanta.

„Jes, mia Tereso,” respondas la knabeto, „ili estas nepre tre belaj.”

„Ĉu paĉjo ne estos tre mirigita, kiam li ekvidos, ke ni venis tien ĉi renkonte al li?”

„Certe, se ja ni ne maltrafu lin. Vi komprenas, ke kiam mi proponis, ke ni iru renkonte al li hejmen venanta, mi ne pensis, ke estas ekneĝonte.”

„Tiel estas”, diris Tereso, „se la neĝo ekfalos pli rapide, ni eble ne povos vidi, kaj tiam nia ruzajeto por plaĉi al paĉjo eble malsukcesos. Vi konas la vojon, Johano, ĉu ne?”

„Ho, tio ne estas malhelpaĵo”, Johano respondis neprecize. Ĉio, kion ni devas fari, estas paŝi tute rekte. Tion ni povas fari, kiel ajn dense neĝas.”

„Kaj plue”, aldiris la knabino, „panjo povas vidi mal-supren trans la neĝeroj, tiel facile kiel se tute ne neĝus. Ĉu ne ŝajnas longtempe, de kiam panjo iris al la ĉielo?”

„Estas longtempe, Tereso. Ŝi estas feliĉa de . . . . ., ja, estas ĝuste unu jaron hodiaŭ vespere, de kiam ŝi kisis nin kaj adiaŭante diris al ni, ke ŝi atendos nin apud Dio.”

„Jes, Johano, kaj ŝi diris al ni, ke ni ne ploru, sed memoru, ke ni baldaŭ denove kunvenos.”

Poste Tereso antaŭen saltis kaj ekkaptis la neĝerojn per siaj manetoj. Dum ŝi malpeze moviĝis meze de la falantaj neĝeroj, ŝi aperis kiel perfekta naskitaĵo de la neĝo. Sed ĵus kiam ŝi flirtis tien kaj reen tiel aere preskaŭ kiel la turniĝantaj kristaletoj, la aero pli kaj pli densiĝis, tiel ke fariĝis kvazaŭ dika, blanka kurteno, apartiganta ilin de la tutmondo. Tereso rapidis rekapti la manon de sia frato. Rigardante lin en la okulojn, ŝi diris:

„Johano, ĉu vi pensas, ke ni perdiĝos?”

Johano respondis la demandon post mallonga paŭzo. Sed dum tiu paŭzo efektiviĝis sanĝo tiel plena kaj impresiga, ke ĝi ne havas nomon. Ĝis tiam, li neniam konis ĉagrenon, neniam renkontis danĝeron. Sed nun! li tuj komprenis; li kaj Tereso estis solaj en neĝuragano, sur vastega stepo, senigitaj de io ajn, kio povu gvidi ilin al rifuĝejo kaj sendanĝerejo.

(*Daŭrigota.*)

Tradukis R. ALEZAIS.